# La NASKa Fasko

*Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe UT-Dalaso*

**merkredo, la 27-an de junio, 2012 • numero du**

## Hodiaŭaj eventoj



★ **8:45 atm – 12:15 ptm: Kursoj**

★ **12:15 – 1:00 ptm: Tagmanĝo**

★ **3:00 ptm: Ekskurso al la naĝejo!** Hoss gvidos vin al senkosta, ekstera naĝejo nur kvin minutojn for. Eble vi ne volas naĝi nun, sed simple volas ekkoni la vojon – tute en ordo: venu! **Kunvenu en la vestiblo de la unua etaĝo.**

★ **5 – 6:30 ptm: Vespermanĝo**

★ **7:30 – ??? ptm: Eventoj en la gufujo** Unue Ray REDD prelegos pri la glaciepoko kaj la grandaj inundoj de la rivero Kolumbio. Poste restu en gufujo por babili, ludi, frandi teon, kaj kleriĝi.

## Ĉu vi bezonas lavi vestaĵojn?



Troviĝas lavmaŝinoj en la unua etaĝo, proksime al la enirejo. (Ili estas senpagaj, kaj eĉ povas sendi tekstmesaĝojn al via poŝtelefono.) Se vi bezonas lesivon, Hoss kaj Tim havas tutan botelon da lesivo por vi en ĉambro #4.018. Venu kaj prenu.

*La NASKa Fasko*


**Redaktejo:** Ĉambro 4.418
<nask.esperanto@gmail.com>

*La NASKa Fasko* estas ĉiutaga informbulteno de la kursaro. Trovu ĝin matene sub via pordo aŭ en la "gufujo" en la 4-a etaĝo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 4.418, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

## Vetero eĉ pli bona ol antaŭe anoncita

*de Derek ROFF*



En la NASKa *Manlibro* por lernontoj, oni diras ke "la temperaturo kutime restas inter 23–33°C (73–92°F)." Sed nia vetero multe superos tion! La nuna prognozo por la komenco de la NASK-a semajno indikas altajn temperaturojn de 39–40°C (102–104°F) tage. Tio estas avantaĝo de 13%! Ni celebru nian bonŝancon!

Antaŭ unu jaro, la Dalasa regiono spertis 71 tagojn super 38°C (100°F), kiu estis rekordo, kaj sinsekva serio de 40 tagoj super tiu varmeco. La serio komenciĝis en la unua semajno de julio, kvankam estis pluraj ekster-seriaj tagoj kun superaj temperaturoj ankaŭ en junio. La jaro 2011 portis plurajn aliajn superlativojn al Dalaso: la plej alta minimuma temperaturo dum unu tago superis 30°C/86°F (kaj tio okazis plurfoje), kaj la minimuma temperaturo por la tuta somera periodo estis 27°C/80°F. La plurfoja atingo de 43°C/109°F estis nova maksimumo por la datoj kiam ĝi okazis, sed ĝi ne egalis al la plej alta temperaturo iam ajn en la loko. En la jaro 1980, oni mezuris 43.3°C/110°F.

Estos varmege, do prizorgu vin. Ni ĉiuj faru nian eblon, por ke la nuna somero venku tiun de la jaro 2011!

## Salutmesaĝo de Spomenka ŜTIMEC

*Spomenka estas kroata verkisto, tradukisto, kaj nuna sekretario de la Esperantlingva Verkista Asocio (EVA). En 2012 ŝi instruas en la supera nivelo de NASK. Vi povas kontakti ŝin retpoŝte ĉe <spomenka.stimec@zg.t-com.hr>.*



Saluton, karaj gelernantoj de NASK-kursaro 2012! Vi venis lerni al Teksaso en la jaro kiam Esperanto festas sian 125-jaran naskiĝtagon. Nia ĉi-jara NASK estas parteto de la centjara naskiĝtagfesto de Esperanto. Vi estas unu parto de la festo! Mi estas via instruistino en la supera kurso. Miaj gelernantoj multe lernos pri literaturo de Esperanto dum nia kurso. Ni legos kune kelkajn interesajn paĝojn el la literaturo verkita originale en Esperanto kaj diskutos pri ĝi. Ne timu! Ne estos komplike.

Mi lernis Esperanton en Kroatujo kiam mi estis 16-jara. Tiam mi vidis ke ĝi estas fenomeno mirinda. Mi komprenis ke multaj homoj devas labori por ĝi por ke ĝi progresu. Kiam mi finis mian studadon, mi decidis ke mi profesie laboru por Esperanto. Ĝis hodiaŭ, dum kvar jardekoj, Esperanto estas mia profesio. Kiel tio eblas? Tio estas longa, komplika kaj amuza historio. Bonvolu foje sidi kun mi ĉe la tagmanĝa tablo por audi kelkajn detalojn, se vi havas intereson.

Mi ankau verkas en Esperanto. Prozon, ne poezion mi verkas. Iun vesperon en nia nokta gufujo vi audos pri mia verkado en Esperanto.

Dankon ke vi venis al Teksaso por vivi kelkajn tagojn en Esperantujo!

# Mapo de nia ĉirkaŭaĵo

